



PENSEO

N-ro 319

majo. / 2018

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 29-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Paulo Silas (Brazilo)



HOMECO

Homo, vi estas plurfunkcia.
Via korpo estas naturmiraklo.
Ilo efika al karitato.
Jen mi sentas, ke la bono burĝonas
en bukolika streĉo.
Dum manoj tiris ŝnuron al dualaj solvoj,
piedo ĝin puŝis orten.
Urinplenaj vezikoj donis kurbojn al aerostato.
Kudrilopiko, eksplodo, kaj flava pluvo sur
flavaj urboj.
En momento de spirohalto, ne disponeblis
aerosolo.
Bonkoraj samarianoj furzis.
Enspiratoroj nutris zumbiojn dum pliaj tagoj.
La elektrolivero ne satigis la modernan
metropolon.
Providenco de bubofingroj en muntoĉeno
produktis milionon da utilaj kandeloj el
humida muko.
Akvo mankis en la kranjoj.
Helpopretaj maskloj kuplis duktojn al duktoj.
Ve! Kial la servistino glitis, falis, mortis,
dum ŝi lavis trotuaron per spermoĵetoj de hoso?
Sekaj haŭtoj de prahistoriaj maljunuloj
bezonis tujan tavolon de kremo.
Gripuloj helpis per frakonoj de verdflava
pasto.
Pro la altaj kostoj de la fero,
kolonoj de konstruaĵo restis duonfaritaj.
Sindonaj arkitektoj sin ĵetis de la supra etaĝo,
profitis de la luksacioj,

elprenis siajn du durajn tibiojn
kaj kun kontento certigis la konstruon.
Homo, vi estas stulte fia.
Stulte vaka en via
klopodo difini homecon.

Tiberio Madonna (Italujo)



NOKTA SCENO

La luno
substreĉita de fadenforma nuboj
heligas
sian luman haloon
kiu ĉirkaŭas kaj envias
ĝin
ĉirkaŭvolvite en la nokto.
La luno
akompanata de timidaj punktetoj
el fajro
disĵetitaj ĉi kaj tie
en la senfina vakuo
ĵus leviĝinta
de l' horizonto
timeme
montras sian vizaĝon
ruĝiĝinta
ĝis ĝi poste
pli alta kaj sekura
fariĝas pli kuraĝa
elmontrante sentime
arĝentan rideton.
La silento
rakontas
libron da emocioj
da rememoroj
por ke oni povu sin luli

en ili
 kaj sugestas
 pensojn
 ŝtelitajn al la fantazio.
 La lampionoj
 ankaŭ ili
 enviantaj la lunon
 estingiĝas unuope
 en la strato endormiĝinta.
 Ĉiu afero
 senmova
 atendanta la morgaŭon
 lasas spacon al la spektaklo
 de lumoj
 en la ĉielo de la nokto.

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



- BEL-konferencoj 2018-

Subite, mia korpo vekigis,
 kaj ridetis al mi.*
 La sano renaskiĝis:
 antaŭpaska miraklo
 el korfavoro dia.
 Esperanta laboro:
 resaniga likvoro.

* La unuajn du versojn verkis Paŭlo Sérgio Viana.

Juiz de Fora – MG Brazilo

Ne krokodilu!

Saluton, mi estas Kroko!
 Ido de grandega esperanta familio!

Saluton, mi estas Kroko,
 Kroko, Kroko, Kroko
 krokodilo!

Mi estas simpatia sed pigra, nestudema,
 bedaŭrinde tro manĝema!
 Ĉar mi ŝatas manĝi akuzativojn
 kun verda salato el pluraloj!

Saluton, mi estas Kroko!
 Bonvolu amikiĝi kun mi!

Juiz de Fora, 15/04/2018

Hans-Georg Kaiser (Germanujo)



Neĝo



Neĝas kaj neĝas kaj neĝas
 senĉese, senfine, senhalte,
 el ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter'
 are flokoj falas elalte.

Pro l' silento de l' neĝo per miaj cerbĉeloj
 io blanka sin montras mistere,
 mi revante cerbumas, mi volus kompreni,
 kion diras la blank' enkapsfere.

Kvazaŭ ia sopir' entenebre kaŝiĝas
 kaj vekigas en mi rememoro...
 Kaj per sento plej stranga, malĝoja kaj ĝoja,
 en mi batas konfuze la koro.

Ĉu la flokoj falintaj, jam ofte viditaj,
 rememore en mi reviviĝas,
 aŭ mi revas pri l' tag', kiu baldaŭ aperos

kvankam ĝi en la nokto kaŝiĝas?

Mi ne volas esplori la senton misteran,
mi nur revas, mi ĝuas, mi spiras;
ion helan mi sentas, heleco min logas,
al heleco la koro min tiras.

*PS: La okuluma poemo estas parodio kaj bazas sin je
konata poemo de Zamenhof. La bildon desegnis Tomi*

Ungerer. (HGK)

Kio gravas?

Se verkisto vorte pavas,
liaj vortoj ne tre gravas.
Ĉu, se vortoj sencon havas,
tiuj vortoj ĉiam ravas?

Kio gravas, kiu pavas,
kio homojn vere ravas?
Pluajn dubojn mi eĉ havas.
Eble ĉiu homo gravas.

Eble gravas la atomoj,
tiom, kiom ni, la homoj.
Eble ĉiu stelo gravas,
eĉ se ĝi ne sencon havas.

Kio plu je vero gravas,
se la parolanto pavas?
Se vi pavas, ĉu vi gravas,
ĉar pavuloj ĉiam pravas?

Kaj se homo mem decidas,
ĉu li plu gravecon fidas?
Ĉu la mondo tuj pereus,
se la hom' gravulojn neus?

Certe gravas kre-pasio
pli ol vanta mondkonscio.
Kaj homara harmonio
li ol nur laborpasio.

Mori (Usono)



AFORISMe (31)

Pro silento de
l' Plejmulto
la Tero,
Iom post iom
fariĝas Infero.

Nur ĵaluzulo
kaj malamiko
pikas homon per
malica kritiko.

Libero apartenas
al homoj kun kuraĝo
la ceteraj homoj
vivas iel en kaĝo

Amiko
ne estas tiu
kiu kunĝuas la vivon
sub la varma suno
sed tiu, kiu helpas
vin meze de tajfuno.

Kiu pli stultas ol mulo
krom fanatika ulo?

Animaloj
ne kiel homoj
vivas en ĝangalo,
sed estas homoj kiuj
vivas kiel animalo.

Tiu, kiu kredas
je teror'
kaj batalo
estas ja animalo
kiu devintus vivi
en ĝangalo.

Nek tro proksima,
nek malproksima
distanco
estas taŭga distanco
por amikeco
kaj paco.

Neniu peko
pligrandas ol tio
ke oni subpremas
homojn
nome de Dio.
(Gandhi)

Teroro
torturo
kaj murdo
nome de ĉiopova Dio
estas fifaro de homo
pli sovaĝa ol
skorpio.

(Okaze de terora atako en
Novjorko. Oktobro. 31.
2017)

Homo
kun granda koro
jam estas granda homo
sen posteno,
sen mono,
sen oro.

Homo
kun bonaj geamikoj
kaj varma domo
estas ja feliĉa homo.

Devo
de ĉiu homo
sur alta posteno
estas kapti la manon
de falinta persono.

Homo ne estas granda
sur alta posteno,
sen esti je la servo
de malgrnda persono.

La tasko
de ĉiu registaro
estas zorgi pri la volo
de sia popolo
kaj ne miksiĝi
en alies aferoj
samkiel kamela kolo.

Malriĉulo
estas tiu kies mono
kaj oro
estas pli granda ol
lia koro.

Dum oni ĝuas
l' vivon sur la tero
ĵaluzulo suferas
en propra infero.

Kie ĉiu homo vivas
kun liber' kaj prospero
tie estas paradizo
sur la tero.

Sukceso
kaj fiasko
estas parto de
ĉiutagaj taskoj.

Se bonkoruloj havus
multe da mono
en la mondo troviĝus
neniu malriĉa persono.

** *

Ene de ĉiu homo
estas konstanta batalo
inter anĝelo kaj
animalo
finfine venkas tiu
kiun oni subtenas
per sia pensa regalo.

Facilas mortigi lupon
per unu simpla pafo
sed unue trovu
lupon kiu aperas
kiel ŝafo.

Tiu, kiu daŭre
pensadas pri mono
estas la plej
malriĉa persono.

Ju pli alta estas
via posteno
estu despli modesta
persono.

Pro konfliktoj
inter riĉuloj
suferas nur
malfeliĉuloj.

Kie leĝoj estas
kontraŭ moralo
homo por vivteni sin
vivas kiel animalo
laŭ leĝo de ĝangalo.

Kie estas ĝangalo?
Tie kie homo vivas
sovaĝe, fripone,
sen moralo.

PAPOS NASCENTES (Brazilo)



Pac-ekesto

nedaŭreco de l' ekzist' sentempeco de la est'
urĝegeco de persist'
sen ajne daŭri – esto estas verb'
movo nur sen substanco

la ludo sin vidi nedaŭra
la fajro eneste ekesti en l' Est'
ami ĉu estos transcend'
de l' ekzist'? ĉu plenigo de daŭrec'
ajna ajne estu ĝi?
ne havu amon estu Am'
ajne estu estu ja
vidu bone kiom bono
bono donas – antaŭveno de plenpac':

ĉion bonon, komunum',
sciuj tuj – estas ni Unuo nun.

Krepusko

ĉu manskribi vin
ĉu tajpe klavi vin
io agitiĝas io ekbolas min
kio vin mi donas tio taŭgas nin
silenton krias mi

kiu papili' (ne scias mi)

tiom da koloroj
ili donis min
ĉiu am' ĉiu amor'
ĉio jen tabul'
desegniĝo via
via profil' odor'
allogas min ĉi vir-abel'
satigas min via miel'
mi polenigas vin
sigelo ĉelo kor'

ĉu manskribe ĉu klavite
mia poem' kor-tuŝu vin
eĉ mia entuziasmo
sveni venu vin
en hebeteca orgasmo
klavomiksiĝo freneze mesaĝa
verso-stelumadas

via buŝplafon'

Wally du Temple (Kanado)



Memeo kaj geno

Klarigis li –

“Memeo egale valoras kiel geno.
Memeo nomas ĉian eron
de kultura informo
kiun unu menso donas al alia menso.
Pensoj, ideoj, teorioj, kutimoj,
Kantoj, dancoj, artoj,

Kaj Lingvoj.

Kaj tiel plu, tiel plu, plu, plu.
Memeoj reproduktiĝas kaj evoluas
Same kiel genoj en biologia evoluo.
Ili ekzistas aliforme por adaptiĝi
Por variigi, mutacii, konkurenci, heredigi
Kaj bezonas ĉiajn engaĝigojn
Por plu vivi, plu vivi, por plua
Evoluo.

Klarigis li –

“Memeo egale valoras kiel geno.
Geno indikanta proteinon
Ekzistas en multaj statoj
Kiel Rusaj pupoj nestas unu en alian.
Genetikaj aliformiĝoj kreas
Diversecon por sekurecoj
Por ekresaltemeco de detruo, ek, ek ,ek
de ajnaj ŝanĝkondiĉoj
En mondo de
Geologiaj kataklizmoj
Kaj klimataj katastrofoj.”

Nek muroj nek forkuroj
De dialogoj kaj disputoj
Pretigos la homaron
Por necesa adaptiĝo.
Nur diversaj konkurantaj kulturoj
Pretigos la homaron por la necesa
Ekresaltemeco, ek, ek ,ek
de ajnaj ŝanĝkondiĉoj
En mondo de
Geologiaj kataklizmoj
Kaj klimataj katastrofoj.”

Kaj lingvoj jese, ankaŭ, jese gravas
Kiel memeoj plej gravaj.
Ili entenas, volvas kulturojn
Kiel haŭto entenas, volvas korpojn.
Se forbruliĝas tro da haŭto, morto de
persono.
Se malaperas tro da parolantoj, morto de
kulturo.
Lingvo estas la haŭto de ajna kultura grupo.

Mi oponas kaj Genecidon kaj Memeocidon!

Eto (Ĉinujo)

Malĝoja nuboj

Vi estas tiu nub' sur la ĉielo
 mildeco estas via belo
 kial nun vi ja fariĝas
 silenta kaj senvorta
 kaj ofte larmojn faligas malforta?
 vi eble plenas je tro da ĉagreno
 pro tio vi ploradas en malsereno
 mizeron vian sentas mi en koro
 mi ankaŭ dronas en doloro
 mi volas blovi kiel vento
 rememoron tristan vian for
 eĉ iom el via morna plendlamento

vi estas tiu blanka nub' sur la ĉielo
 flirtado estas via flosa velo
 sed jen nun vi fariĝas deprimiĝa
 sen ĝojaj ridoj kaj paroloj
 kaj kun tristeco kaj korŝiraj foloj
 mi tiom ŝatus esti varma vento
 por al vi sendi iom da miela dolĉo
 kaj por konsoli vin eĉ dum momento

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



Trans la barilo
 rava roz' kaŝrigardas.
 Najbaro revas.



La manoj petas
 bluson. Piano tristas.
 Botel' da "Sherry".



Tablo, du taso,
 krucigitaj rigardoj.
 La kafo amaras.



Petu la lunon
 montri al vi la padon.

Sola mi estas.

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKTRIA

La Taŭno de la ĉielo

§13-04

Dum sia vizito al Laŭzi, Shicheng Qi (fikcia persono trad.) demandis:

“Mi aŭdis, ke vi estas saĝulo, kaj tial mi faris longan vojaĝon por vin vidi. Mi marŝis cent tagojn sen ripozo ĝis miaj piedoj kaliĝis. Nun ke mi vin vidas, mi trovas, ke vi ne estas saĝulo. Sur la tero ĉirkaŭ la musotruo restas grajnoj kaj legomoj, kiujn vi malŝpare forĵetis. Tio ne estas humaneco. Vi havas pli da nutraĵoj, ol vi povas konsumi, kaj tamen vi faras ankoraŭ plian amasigon.”

Indiferenta, Laŭzi ne respondis.

En la sekva tago Shicheng Qi refoje iris viziti Laŭzi kaj diris:

“Hieraŭ mi kritike pikis vin, sed nun mi sentas min konfuzita. Kial do?”

“Jam de longe mi ne ĝenas min per la ideo pri la saĝeco aŭ la sagaceco. Se hieraŭ vi nomus min bovo, mi konsentus kun vi; se vi nomus min ĉevalo, mi egale konsentus kun vi. Ĉar se mi vere estas io kaj mi ne akceptus la meritan nomon, kiun oni donis al mi, mi aldonus kulpon al mia eraro. Mi ĉiam cedas al mia natura inklino, kaj neniam cedas nur pro la cedo.”

Paŝante kun la flanko antaŭen, kvazaŭ por eviti vidi sian ombbron, Shicheng Qi alproksimiĝis al Laŭzi en humila maniero kaj demandis:

“Kiel do mi min kulturos?”

“Via mieno estas fiera; via rigardo estas

penetranta; via frunto estas elstara; via lango estas akra; via sinteno estas malhumila. Vi estas kiel ĉevalo enĉenigita. Vi volus galopi, sed vi estas bridita. Vi povas manifestiĝi kiel sago sur arbalesto. Vi observas kaj ekzamenas. Vi estas sprita kaj aroganta. Neniu el tiuj ĉi estas parto de via denaska naturo. Tia homo en la malproksima landlima regiono estas nomata 'ŝtelisto'."

§13-05

La majstro diris, ke la Taŭo ekzistas en estaĵoj kiel grandaj, tiel ankaŭ malgrandaj, tial ĝi ekzistas en ĉiuj estaĵoj en la mondo. La Taŭo estas tiel vasta, ke ĝi ĉion ampleksas; ĝi estas tiel profunda, ke ĝi estas nesondebla. La puno kaj la rekompenco, la humaneco kaj la justeco estas la plej altaj formoj en la morala mondo. Kiu escepte de la perfekta homo povus doni al ĝi signifon? Ĉu ne estas granda la perfekta homo, kiam li regas super la mondo? Kaj tamen nenio povas fariĝi por li ŝarĝo. La homoj en la mondo batalas inter si por la potenco, sed li ne implikiĝas en tio. Li sin tenas je sia denaska naturo kaj la avantaĝoj de la materialoj havas nenian influon sur lin. Li klare vidas la propran naturon de ĉiuj estaĵoj en la mondo kaj kroĉiĝas al la komuna radiko de ĉiuj estaĵoj. Rezulte de tio, li povas forgesi la ĉielon kaj la teron kaj neglekti ĉion en la mondo, kaj lia menso estas neniel perturbita. Li bone komprenas la Taŭon kaj identigas sin kun la virto; li apartigas sin de la humaneco kaj la justeco; li forĵetas la ritojn kaj la muzikon. Tiel agante li havas la menson en paco.

§13-06

La Taŭo, kiun la popolo alte ŝatas, estas en la libroj. Tio, kio estas skribita en la libroj, estas ne pli ol vortoj, kaj la vortoj estas valoraj. La valoro de la vortoj estas la ideo, sed tio, kio estas pli valora, kuŝas en la signifo, kiu estas legata inter la linioj. Tio, kio povas legata inter la linioj, estas ekster vortoj, kaj tamen oni ŝatas la vortojn kaj transdonas ilin per la libroj. Kvankam ĉiuj homoj en la mondo alte taksas la librojn, mi tamen trovas ilin ne multe valoraj, ĉar tio, kion oni alte taksas, ne estas vere ŝatinda. Tial, tio, kio povas esti vidata de mi tiam, kiam mi rigardas, estas nur la formoj kaj koloroj, kaj tio, kio povas esti aŭdata de mi tiam, kiam mi aŭskultas, estas nur la nomoj kaj

la sonoj. Ho ve! Ĉiuj homoj en la mondo bedaŭrinde opinias, ke pere de la formoj, la koloroj, la nomoj kaj la sonoj oni povas ekkoni la esencon de la Taŭo! Kaj tamen ili ja ne estas sufiĉaj por ekkoni la esencon. Tiuj, kiuj scias, ne parolas, dum tiuj, kiuj ne scias, parolas. Kiel do la homoj en la mondo povus kompreni tiun ĉi simplan veron?

§13-07

Iun tagon, la duko Huan de la regno Qi legis librojn en salonego, dume la ĉaroriparisto Bian ripariris radon en la korto. Demetinte sian martelon kaj ĉizilon, la ĉaroriparisto venis en la salonegon kaj demandis la dukon, dirante:

"Pardonon, ĉu mi povus demandi, kion vi legas?"

"La vortojn de la saĝuloj," respondis la duko.

"Ĉu la saĝuloj ankoraŭ vivas?" demandis la ĉaroriparisto.

"Ili ĉiuj mortis," respondis la duko.

"Tiuokaze ĉio, kion vi nun legas, estas senvalorajoj postlasitaj de la antikvuloj!" diris la ĉaroriparisto.

"Kiel vi, ĉaroriparisto, aŭdacas doni vian opinion pri tio, kion mi legas? Mi tamen permesas al vi fari klarigon. Se via klarigo plaĉos al mi, mi vin pardonos; alie, vi estos mortigita."

"Mi observas aferojn el la vidpunkto de mia metio. Kiam mi faras radon, se mi hakas malrapide, la spokoj ne estos strikte alĝustigitaj kaj la rado ne estos solida. Se mi hakas rapide, la spokoj estos tro striktaj kaj ne adaptiĝos al la rado. Se mi hakas nek tro malrapide, nek tro rapide, la lerto manifestiĝas per miaj manoj kaj sentiĝas en mia koro. En tio certe troviĝas io neesprimebla per la vortoj. Mi ne povas diri al mia filo, kio tio estas, kaj mia filo ne povas lerni tion de mi. Jen kial mi ankoraŭ laboras kiel ĉaroriparisto eĉ en la aĝo de sepdek jaroj. La antikvuloj mortis kaj foriris kun ĉio, kion ili ne povis transdoni per vortoj, kaj sekve ĉio, kion vi nun legas, estas senvalorajoj postlasitaj de la antikvuloj."

Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Honto

el la rakontoj pri Afanti

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Ŝtelisto
venis kaŝite
en hejmon de Afanti
kiu sin kaŝis glite
en keston sprite.

En ĉambro
ŝtelisto pene
serĉis ĉie, ne trovis
valoraĵojn singene,
paŝis ĉagrene.

Li fine
malfermis ŝtele
la keston, surprizite
vidis Afanti-n ele
de l' kest' anhele.

Demandis
ŝtelisto mire:
“Kion vi faras ene?”
Afanti jen suspire
diris spirtire:

“Pardonon!
Ĉar ne povas vi
trovi riĉaĵojn dome,
pro honto min kaŝis mi
en keston sen kri’.”

Soifa poŝo

el la rakontoj pri Afanti

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

En festen’
Afanti klare
vidis gaston enpoŝen
meti panojn avare
kaj sendeklare.

Afanti
tekruĉon ŝtele
prenis kaj verŝis teon
en lian poŝon vere,
tiel kruele.

La gasto
ĉuis ŝokite:
“Kial vi faris tion?”
Afanti senhezite
diris ja sprite:

“Via poŝ’
soifas certe.
Ĝi jame manĝis panojn,
sen akv’ ĝi senaverte
formortos merde.”

Yanke (Ĉinujo)

Pontoj en mia hejmloko

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Mi staras
sur alta roko
fronte al la direkto
de la kara hejmloko
trans nuba bloko.

La pontoj
tie en menso
mia ĉiame vekas
sopiron en intenso
de senta denso.

Mi ŝatas

tiujn sincere
 pontojn oldajn kaj muskajn
 kun kelkaj arkoj vere
 al mi fiere.

En knabec'
 mi ludis tie
 amuze kaj senĝene
 kaj en akvon defie
 saltis ĝojkrie.

Frekventis
 mi ir-reire
 lernejon ĉiutage
 trans la pontojn facile
 per paŝoj brile.

Vizie
 ili solide
 transpontas super fluoj
 torentantaj senbride
 al sud' rapide.

La pontoj
 centojn da jaroj
 travivis mil damaĝojn,
 post novigaj riparoj
 kun firmaj staroj.

Ja ili
 kun miaj revoj
 kaj hejmveoj amaraj
 restas dum tempaj levoj
 kaj temp-mallevoj.

Pri ili
 de malproksime
 mia sopiro ĉiam
 sin etendas senlime,
 daŭras senfine.

Eto (Ĉinujo)

Viro sub stratlampo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo**

Pen'
 en klopodado por gren'
 lin ĝenas
 vere por vivten'.

Vag'
 ĉien en lia imag'
 hezitas
 ankoraŭ en svag'.

Sub
 stratlampo, kun multa dub',
 pripensas
 li kvazaŭ en nub'.

Ne
 definitiva ide'
 aperas
 pro cerba pane'.

Kun
 cigared' enbuŝe nun
 cerbumas
 li jen sub la lun'.

En
 fumnebul' li kun ĉagren'
 paŝadas
 tien kaj reen.

Al
 nenio en la real'
 lia pens'
 venas ĝis final'.

Ve,
 li cerbumas forte tre
 kun menso

*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

ja de malobe’.

***Deskses-Silabo: ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Fjodor Kuzjminskij

Lusja

Preskaŭ ĉiuj kunlaborantoj de ĉefa oficejo de firmao “Rzhats & Co” tuj komprenis, ke ĉe ĝenerala direktoro, prospera komercisto Anempodist Rĵac, “iu aperis”. Ŝanĝoj en lia konduto estis tre rimarkeblaj por aliaj homoj: senpensa rideto, stranga rigardo, aperinta malkoncentriĝo. Ĉi ĉio estis neordinare por tiu homo, dua nomo de kiu estis Podja Kuncjevskij.

– Li ekamis! – ĉefa administrantino Inga Leonardovna kategorie diris balancante orelringojn de *Chopard*¹.

– Simile tiel, – sekretariino Lenoĉka interkonsentis mordante per egalaj blankaj dentoj skribilon de *Montblanc*.

Du tiuj virinoj jam delonge malhoneste provis ricevi aliro se ne al koro de ĉefo (malhelpis Adelaida Prokofjevna, edzino de Rĵac) do almenaŭ al lia lito kaj post ĝi al sufiĉe granda monujo.

Tiuj reprezentantinoj de unu sekso sed, ve, de diversaj generacioj jam imagis pligrandiĝon de propraj salajroj, karieran kreskon, ŝanĝon de aŭtoj, ripozon en Balio kaj aĉeton de propra loĝejo.

Inga Leonardovna, pli supera laŭ ofico kaj pli aĝa, 35-jaraĝa seninfana eksedziĝintino, pli reale rigardis sian vivon, kaj melodio de nupta marŝo de Mendelssohn ne tuŝis cerbon de ŝia ruĝhara kapo.

En cerbo de 20-jaraĝa blonda sekretariino de tempo al tempo aperis demando – ĉu modaj estas fianĉinringoj de *Carrera y Carrera* kaj nuptaj roboj de *La Sposa* kaj *San Patrick*? Tiu demando ofte aperis post erotikaj fantazioj pri sinjoro Rĵac, ĉar Lenoĉka estis certa, ke “tia hundino Adelaida” ne estas kontraŭulino por ŝi.

“Kiu estas lia nova amikino?” – demando sidis en kapoj de estintaj rivalinoj. Efektiva ekzisto de edzino

– Adelaida Prokofjevna Rĵac – en tiu etapo ĉesis tuŝi ilin.

Anempodist laŭ kelkaj signoj ĉesis simili mem sin.

Antaŭe Podja ne estis aktiva uzanto de Interreto ĉiam parolante: “Kie estas mi, kaj kie estas Interreto?”, sed nun li sidis ĉe komputilo dum multaj horoj.

– Li uzas retpoŝton, – Inga Leonardovna rimarkis.

– Aŭ li retumas en ia socia retloko, – Lenoĉka jesis.

– Ĉu verŝajne tio estas “odnoklassniki.ru”?²

– Verŝajne...

Foje Inga Leonardovna eniris al kabineto de Rĵac por subskribi vicajn dokumentojn. Anempodist sidis senpense rigardante monitoron kaj premis per dikaj fingroj klavojn. Kvankam ĉefa administrantino provis, sed ne sukcesis enrigardi monitoron.

– Kiel ĉi ĉio estas neatendita... Mi scias nenion pri vi...

Aŭditan frazon ŝi tuj diris al sekretariino, kaj konspirantinoj en tiu tago fumis kaj trinkis kafon pli longe ol kutime...

Ankoraŭ unu stranga epizodo estis veno de sinjoro Rĵac al oficejo kun bandaĝita gorĝo. Pro miraj rigardoj de kunlaborantinoj Anempodist murmuris ion pri angino kaj malaperis en sia kabineto.

– Ĉu angino? – ĉefa administrantino redemandis. – Ĉu en tia vetero?

– Li kaŝas signojn de pasiaj kisoj, – Lenoĉka diris kun neatendita kolero. – Ŝi estas pasia ĉe li!

– Ŝi estas stultulino ĉe li! – Inga Leonardovna resumis. – Saĝa virino ne lasis signojn sur edziĝinta viro!

Kiam Anempodist ĉiutage komencis ekspedi gardiston de oficejo al apuda vendejo pro freŝaj legomoj kaj fruktoj, miro de virinoj pligrandiĝis ĝis limo.

– Li uzas dieton, – Lenoĉka ekspiris.

– Aŭ ŜI estas vegetaranino, – Inga Leonardovna rimarkis.

Rjac pli malmulte kaj pli malmulte atentis komercon transmitante aferojn al ŝultroj de helpantoj kaj pravigante sin per senfina laco kaj kronika malbona dormo. Pro tio konkurencanoj interkaptis paron de profitaj kontraktoj. Pompan forveturon de neiĝintaj partneroj (kun ruzaj ridetoj sur vizaĝoj) Podja kondukis per pompa frazo: “Iru en pugon, virkaproj!”

Afero atingis tion, ke per interurba linio kelkfoje telefonis peterburga partnero, indiĝena peterburgano Modest Lurje, kaj en interparolo kun Anempodist aktive uzis idiomajn frazojn, senco de kiuj estis “ne okupu sin pri ĉia bagatelo” kaj postulo pli multe atenti kunajn projektojn.

Rezulte Modest iris tien, kien iris neiĝintaj partneroj.

Plu estis pli malbone. En unu vespero Podja drinkinte sole sepcent gramojn de konjako de *Ballantines* ekdormis en sia apogseĝo.

Kiam Lenoĉka alportis al ĉefo vesperan kafon *Cappuccino*, li diris dum dormo kun ĝua rideto:

– Lusja...³

Sekretariino kuregis el kabineto kaj ĵetis sin al ĉefa administrantino. Per arda flustro ŝi parolis al orelo de Inga Leonardovna:

– Ŝia nomo estas Lusja! Ĉu vi aŭdas? Lusja!

– Tio estas interese, – Inga Leonardovna enpensiĝis. – Ĉu ŝia nomo estas Ludmila aŭ Lusjen?

En siaj pensoj ĉefa administrantino inkliniĝis al “Ludmila”, ĉar “Lusjen” evidente kontrastis kun Anempodist Rjac.

Dum kelkaj tagoj konspirantinoj preparolis hipotezan Lusja trovante pli multe kaj pli multe da mankoj kaj venante al unu opinio, ke nek “Ludmila” nek “Lusjen” ne povas esti inda je eĉ etfingro de ĉefa administrantino kaj des pli je ĉarma sekretariino.

Kaj kien Rjac rigardas?

Aparta motivo por konsterniĝo de kunlaborantinoj iĝis demando, kiun foje Podja demandis. Ne konjektante pri sekvoj li demandis:

– Knabinoj eksciuj, kia vetero nun en Galapagoj?

Demando ĵetis “knabinojn” al profunda tranco.

Krom tio, ke ĉefo sciis pri ekzisto de tiu arkipelago en Pacifiko, li ankaŭ ĝuste prononcis ĝian nomon.

– Li veturigis ŝin al Galapagoj! – Lenoĉka teruriĝis.

– Ekzotikan ripozon la hundino ekvolis! – Inga Leonardovna tra dentoj diris.

– Kiom kostas vojaĝo tien? – sekretariino demandis rigardante mapon de mondo.

– Mi ne scias. Sed mi pensas, ke ĝi estas tre multekosta, – ĉefa administrantino respondis pikinte per fingro bluan pli maldekstre de Ekvadoro.

“Finbatis” merkantilismajn sinjorinojn apero de Anempodist en ĉemizo de *Servic*. Teruran konsternon ekscitis ne ĉemizo, sed videblaj helaj grataĵoj sub ĝi sur brusto de ĉefo.

– Kiel en “Ĉefa instinkto”⁴, – Lenoĉka diris.

– Tie heroino estis pli saĝa, ŝi gratis dorson, sed tiu fivirino gratas bruston, – Inga Leonardovna diris tra dentoj.

– Ĉu verŝajne ĉefo estas masoĥisto? – sekretariino demandis klakante per okulharoj.

Ĉefa administrantino atente rigardis ŝin pensinte: “Plebanino!”, sed aŭdeble diris nenion.



Ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova

Dum la sinjorinoj parolis pri tio, kiel helpi al amata ĉefo, iliajn sendube noblajn impetojn haltigis en oficejo apero de MEM Adelaida Prokofjevna Rjac vestinta sin per afera kostumo de *Nick Osipoff*.

Post dekminuta kverelo en kabineto de edzo Adelaida Prokofjevna rompis karafon por viskio kaj elsaltis el kabineto en ekstrema grado de ekscitiĝo. Post ŝi apud pordo aperis Podja murmurante:

– Adelaida, ĉio estos bone...

